

Tagiĝo 15

Neregula cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.

Eldonas Dům osvěty, odbor-Esperanto, adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 18, Opava

Paco - signifas vivi!

Se ni statistike konstatus, kiu vorto lastatempe en tuta mondo plej multe frekventas, ni estus surprizitaj ke ĝi estas tute eta vorteto – paco. Jes, paco estas tiu mallonga vorto, kiu en si esprimas ĉiujn sopirojn kaj dezirojn de nacioj, ĉiun feliĉon kaj kontenton de homo.

Kaj tial nur malfacile ni komprenas, ke tio estas denove homo, kiu klopodas, per tiom da oferoj pagitan pacon denove minacigi. Ja ankoraŭ tio ne estas longe, kiam finbrua la lastaj kanonoj de terurega milito, ja ankoraŭ ne estas sekaj larmaj sur vangoj de virinoj kaj infanoj, al kiu milito deprenis edzojn kaj patrojn, ja ankoraŭ eĉ ne estas precize konataj numeraj de perdoj je homvivoj, kaj ankoraŭ longe oni devos konstrui denove tion, kio estis dum tiuj kelkaj militjaroj ruinigita. Tial ni devas diri, ke ĉiu, kiu kuraĝus etendi sian kriman manon je tiu sange akirita paco ne estas homo. Kaj ni kiuj en nomo de paco kaj libereco donis ofere tion plej valoran kion ni havis - la vivon ni simplaj civitanoj de ĉiuj ŝtatoj sen diferenco de raso kaj nacieco, de politika kaj religia konvinko, ni ĉiuj, en kiuj ankoraŭ la krima pasio post gajno kaj potendo ne detruis homan koron, ni staras firme en unu nevidebla, sed potenca armeo, organizitaj nur per nia firma kaj persistema volo la pacon konservi.

Ni estas nombro centmilionaj kaj tamen ni estas tiel proksimaj al ni. Jes, ĝuste en hodiaŭa tempo, pli ulte ol kiam ajn antaŭe ni devas konsciigi la saman celon de niaj klopodoj, ke hodiaŭ pli multe ol kiam ajn en pasinteco estas necesa unueco kaj reciproka frata amo. Estas necese starigi apud si ministron el Dombas, havenlaboriston el Londono, nigrulon el Ameriko, studenton el Oxford, la danan kampariston kaj ĉeĥan ministron, korean batalanton kaj svedan kuraciston - estas necese montri al ĉiuj, ke laboras ĉiu propramane, sed ĉiu fine por pli bona vivo de homo kaj ne por ĝia neniigo.

Kaj ĉi tie elstaras tasko ĝuste por ni Esperantistoj. Ja, Esperanto formiĝis en koro de sia kreinto kune kun pensoj fratigi naciojn, kun ideo de hela harmonio kaj amo inter popoloj. Ni ekkomencu tial per ĉiuj niaj fortoj tiun sanktan batalon, ni klarigadu, konvinkadu! Ja esperantistoj estas jam hodiaŭ en ĉiuj landoj de l' mondo. Esperantisto, tio estas verdire standardportisto kaj pioniro de paco! Tia laboro estas plej bona uzo de granda ideo de nia Majstra Zamenhof. Fiere jam ĉiu aŭdu la klaran kaj unuecan parolon, estu lia nomo kiu ajn, ke ĉiuj nacioj de mondo malamas militon, malamas ĉiun, kiu klopodas ĝin ekkomenci, ke ili deziras pacon kaj feliĉan vivon por si kaj siaj infanoj.

Ni kredas, ke tiu reciproka interkomprenigo de nacioj ne estas nur foraj idealoj de estonteco, sed ke jam baldaŭ eksonos en mondo unueca kanto de amo, libero kaj paco, kaj ke tiu ĉi kanto estos tiel forta, ke jam neniu havos kuraĝon interrompi ĝin per nova militmarŝo.

Baja

Organizaj aferoj.

Proksimiĝas jam la 3-a monato de la tempo, kiam ni enpaŝis kaj ekkomencis seriozan laboron de nia interjunulara konkurso, kaj tio signifas, ke en venonta numero de Tagiĝo ni devos publikigi la unuajn fruktojn de nia laboro, la rezltojn de bona aŭ iom mapli bona poresperanta agado. Kiel nun speguliĝas la afero, inter la plej bonajn kolektivojn de junularaj grupoj viciĝas la regiono de s-ano Werner /t.s. Brno, Třebíč/ kiu vere serioze kaj kun fervoro praktikas sian funkcion de reg. peranto. Lia laboro estas imitinda. Ankaŭ tre bone agas Ostrava regiono, t.e., grupoj Opava kaj Ostrava, kies reg. perantino estas ankaŭ vigla en sia funkcio. Bedaŭrinde en tiu regiono ne aliĝis al la konkurso bone aganta grupo Přerov kaj Olomouc nure nun montras iajn signojn de vekigiĝinta vivo. En Buhemio ne vidiĝas tiel aktiva vivo, krom la grupo Pardubice, kies reg. peranto s-ano Franc ankaŭ eldonis sian monatan reg. cirkuleron, kaj estas videbla ke Pardubice ankaŭ vivas. Pri aliaj grupoj oni ankoraŭ ne povas diri ion precizan, ĉar la raportoj estas sendataj aŭ neregule aŭ tute ne. - Ĉu tio estas vero samideanoj el Praha kaj ĝia regiono? - En Sudbohemio vivas nur unu grupo - Písek, sed bedaŭrinde ni ne ricevadas la raportojn de ĝi, ĉar tute mankas por tiu ĉi regiono la reg. peranto. Nure en tute lasta tempo ni eksciis, ke s-ano Vlk militservas, malgraŭ tio ke mi kelkfoje skribis tien, mi pri tiu afero ne estis informita. Mi esperas ke en la funkcio de reg. peranto anstataŭos lin s-ano Křivánek el Písek, kaj ke la situacio tie pliboniĝos.

Tre mi bedaŭras, ke al la konkurso aliĝis nek unu grupo el Slovakio. Ĉu vi ne volas man-en-mane kunlabori kun ĉeĥaj s-anoj, ja ni ĉiuj devas esti la firma unuigita kolektivo.. Ankoraŭ ne estas malfrue doni al ni vian manon survoje al nia celo.

Mi ankoraŭ ne volas doni iajn precizajn numerojn pri lastato de nia konkurso, ĉar mi kredas ke en la lasta tempo povas ankoraŭ multe ŝanĝiĝi kaj ke vekigiĝos ankoraŭ tiuj, kiuj nuntempe dormas.

Tial mi petas ĉiujn lokajn grupojn: skribu raportojn al viaj reg. perantoj. Kaj reg. perantoj en formo de nia regiona cirkulero skribu la tutan resumon de la akirintaj poentoj de tempo kiam ni enpaŝis la konkurso. La modelo por vi estu la cirkulero de s-ano Werner, de kiu vi certe ĝin ricevadas, kaj mi petas faru ĝin ankaŭ tiamaniere. Grupoj, kiuj ankoraŭ ne sendis la nomaron de siaj memoroj - tuj ĝin forsendu. De reg. Praha mi havas eĉ ne unu membro-nomaron de grupoj. Ĉu mi ĝisatendos ĝin??

Via Centrejo

Literaturo.

Ni prezentas al vi liston de haveblaj kultuaĵoj, kiujn disponas Junularo Brno. Kiu interesas pri io, skribu al: s-anino Draha Chlubnová, Charbulova 90, Brno 18.

Originalaĵoj

Adamson Henrik: Rezigno - Auld William: Samideaneto; Al mia amatino neespeantista - Baghy Julio: Ivaĉjo; Dolora deziro; Sangaj larmoj;- Dinwooddie John S.: Songinfano; Al rozpetolo trovita sur la vojo. - Drezen, Hilda: Norda naturo; Vizaĝoj; Printempo; Betulo; - Hohlov Nikolao: Mia vojo; Vintra fabelo, Duelo, - Hovorka Nikolao: Patrujo - Kaloczay Kolomano: En amara horo; Al knabino nur balbutanta Esperanton; Ŝi amas min; Mondhaveno; Aŭtuno, - Kořínek Jiří: Sen homa mezuro; Super la Kvaropo; Hodiaŭ eblas ne!; Promeno; Sur la lito hospitala; Noktoj sur fera lito; Lastaj dek tagoj martaj; Al la dekkvina de decembro ; La Septembroj! - Georges de Maura: Letero, - Pič Karolo: Mi volus; Mia dekadenco; Ne estu naiva; Globtrotanto; Virinaj larmoj; En rozĝardeno;- La tunelo S-ta Gottardo.- de Rosetti Reto: La taglibristo; Fabelo pri kompatinda Ŝolem. - Suchardová Eva: Aktorino.- Totsche Ludoviko: Adiaŭo.- Urbanová Eli: Ŝi ne venas.

Tradukoj:

de Hromada Rudolf:

Bezruč, Petr: Mi; Ostrava; Kantor Halfar; - Svatopluk Čech: Dagmar. - Dyk Viktor: Patrujo parolas /kune kun Dr. Pumpr kaj J.Kořínek/ - Heyduk Adolf: Donu manon al mi. - Hořejší Jindřich: Muziko sur placo. - Kaminský Bohdan: Kristnaska kanto. - Kožík František: Sapiro. - Kříčka Petr:

Medynia Glogowaká – S..K.Neunann: Kanto vendreda; En aprilo. - Seifert Jaroslav: En angulo ĉe l'patrino, Printempa tago; Kristnaska kanto; Junio; Nokto. - Jos. Václav Sládek: Neĝoviro; Ĝi longe for. - Frána Šrámek: Morto; Arbaro; Amanto en aprilo; Virino kaj unika vir'; Advento; Fabelo; Decembro; Printempa migranto; - Karel Toman: Kanto; Marto; Advento; Novembro, Oktobro - Jaroslav Vrchlický: Arbara motivo; Kristnasko; Eklogo V. - Závada Vilém: Ĉeĥa paco-kanto. - Julius Zeyer: Pilgrimo.

de Kořínek Jiří:

a/ Muziko-arioj, kantoj:

Bendl Karel: Peto de kantisto. - Beethoven L.: La amantot Fajrokoloro. - P.I.Čajkovskij: La Pika Damo -/Ario de Liza el 4a akto, Duelo de Eliza kaj Paulina el 1-a akto, Ario de duko Jeleckij;/ Eŭgeno Onegin /Ario de Lenskij/ Donizeti Gaelano: Kavatino de Korina el opero Don Pasquale. - Chopin Frederik: La soldato. - Bedřich Smetana: Ario de Skřivánek el Opero "La sekreto. Giuseppe Verdi: Dueto de Ĝilda kaj Rigoletto el 2-a akto. - Yradier Sebastian: La Paloma. - Isak Dunajevskij: Floras la viburno. - Nacia kanta: Du forĝistoj sur la plac'.

b/ Poemoj:

Asejev Nikolaj: Somera letero. - Jirko Miloš: Marta tago. - Mahen Jiří: Instruo de Bibliamanto. - Jan Neruda: Al patrino. - Klášterský Ant: Balado pri animo de Neruda /melodramo/. - Jan Neruda: Maja balado. - Seifert Jaroslav: Printempo; Septembro; Aŭtuno; Kiam pri ni vi legos; - Scheinpflugová O.: Printempa. - Vrchlický Jaroslav: Hakon/melodramo/; Venis aŭtuno; Por iom da amo; Printempa. - Jiří Wolker: La mortanto.

de Lukáš Miloš:

Neruda Jan: Montara balado.

de Dro Tomáš Pumpr:

J. Š. Baar: Alaŭdo; - Petr Bezruč: Kampo sur montoj; - Petr Kříčka: Glitejo sur trotuaro. - Jan Neruda: Romanco de Kristnaska tago; Maljunulo en parko. - Jaroslav Seifert: Antaŭ ol printempo venos; - J.V. Sládek : Tri reĝoj - Jar. Vrchlický: Aŭtuno venis. - Jiří Wolker: Kanto de falanta neĝa floko.

de Vondroušek Josef:

Fragmentoj el teatraĵo: Andreo kaj Drako de V. Dyk.

... oooo000ooooo....

Konkurso: Solvo de lasta konkurso – Ĉevaliro:

"En Esperanto ni trovu ne nur ĝuon, sed ankaŭ ĝojon, ke ni laboras por nobla ideo kaj por eterna paco en la mondo."

Solvon sendis: S-anoj Jaroš kaj Spáčil el Opava,

s-anino Reithárková el Hradec Králové,

s-ano J. Forman, Vl. Novotný kaj Vl. Novobilský el Praha.

Junulargrupoj ricevas po 10 poentoj.

-TAGIĜO-

Připravujeme 3. letní esp. tábor 1954 v údolí řeky Moravice u Opavy.

Uprostřed lesů, obklopena zelení stromů a svěžích luk protéká ještě nevelká říčka Moravice, jejíž vody přeskakují přes kameny a leckde tvoří vhodná místa ke koupání. A v tomto zdravém prostředí, kde sluníčko dovede zbarvit bílá těla do hněda, tam se již po dvakráte sešla esp. mládež z naší republiky, aby strávila pod stany 14 dnů plných nadšeného úsilí pro Esperanto, aby se zdokonalila v esp. historii a literatuře, a aby odnesla nové poznatky jak si počínat ve vedení a organizování činnosti ve svých skupinách. Toto kamarádké prostředí upevněno přísným táborovým řádem, kterému je každý příslušník tábora povinen se podřídit, vytvořilo kolektiv, který jen nerad

mnozí se slzami v očích se loučili s táborem.

Všichni jsme se těšili na nové léto a slíbili jsme si, že se opět sejdem a prožijeme na tomto táboře nových nezapomenutelných 14 dnů. Veselé, skotačivé mládí, které strhne i starší k družné zábavě, tak že nakonec jsou uspokojeni všichni.

Pro velký zájem hodláme letos v létě uspořádat 3 turnusy po 14 dnech v každém asi po 25 příslušnících, a to od 5. července do 15. srpna t.r. Je jistě třeba si již nyní naplánovat svou letní dovolenou, a co hlavního, již nyní si spořit na tuto svoji rekreaci peníze. Za 14-denní pobyt v tomto táboře se zajištěním vydatné stravy bude se pohybovat cena asi kolem Kčs 200,--. /Jak tomu bylo min. roku/.

Aby byl vyloučen veškerý chaos, který obvykle s pozdním přihlašованиеm a vyřizováním 50% slevy na dráze před začátkem turnusu nastane, prosíme, abyste se prozatím polozávazně přihlásili a to v nejkratší době. Poslední termín k závazné přihlášce s ohledem na velký zájem a tento tábor určíme na 1. června t.r.

Navrhujeme všem zájemcům, aby již nyní spořili a to u naší St. Spořitelny v Opavě, kde máme k dispozici své konto č. 8155. Ke spoření použijte naši složenky, kterou vám na požádání zašleme. Neopomeňte však na ní uvést, že se jedná o spoření na Tábor. Toto spoření je zcela nezávazné a změníte-li své rozhodnutí do 1. června t.r. budou vám peníze ihned odeslány zpět.

Proto všichni, kdo jste mladí nebo se cítíte mladými, napište nám, v kterém běhu byste nejraději se tábora zúčastnili. Podle možnosti vám vyhovíme nebo případně vám včas oznámíme, které období je ještě pro Vás volné.

Pro informaci sdělujeme, že rozdělujeme tyto 3 turnusy asi na tyto kategorie:

5. -18.července - pro začátečníky nebo mírně pokročilé.
19. - 1. srpna - pro mírně pokročilé nebo již znalé Esperanta.
2. -15. srpna pro pokročilé a pro vedoucí skupin, kde bude věnováno největší usílí dát našim gestanům pokud možno co nejvíce poznatků, jak si počínat při vedení schůzek a jak organisovat hnutí esp. mládeže.

Mezi 2. a 3. táborem t.j. asi v neděli 1. srpna bude svolána celostátní schůze mládeže a bude zhodnocena celá dosavadní její činnost.

Těšme se proto všichni společně na tyto naše esp. tábory a přejme si aby svůj ukol a význam co nejdříve splnily.

Již nyní na shledanou s vámi v údolí Moravice se těší

JUNULARO O p a v a

U P O Z O R N Ě N Í

Barevný i černo-bílý film z esp. tábora 1953 v údolí Moravice vám zdarma zapůjčíme. Žádáme pouze úhradu poštovného. Má-li některá skupina o tento film zájem, zapůjčíme jej na dobu 14 dnů. /Jedná se o úzký film/

Rovněž zapůjčíme album fotografií z tohoto tábora, za stejných podmínek.

xXx

Obstarávání stanů na tábor -

Vyzýváme všechny, kteří chtějí pomoci našemu táboru, v naší nejožehavější otázce, obstarání stanů. Nutně potřebujeme zapůjčit každé množství stanů nebo jednotlivých dílců na dobu 6 týdnů.. Kdo má možnost tyto stany obstarat, pište na redakci tagiĝa. - Neodkládejte, nutno vyřídit ihned!

xXx

XXXX - Upozorňuji ty, kteří by chtěli v našich kursech přednášet učebnou látku, buď jako vedoucí kursu pro začátečníky nebo pokročilé, vedoucí historicko-literárního kroužku nebo kroužku pro předávání zkušeností a námětů jak naše schůzky a kursy organisovat, že tito mohou se tábora zúčastnit bezplatně. Oznamte nám již nyní, kteří se chcete k tomuto úkolu přihlásit.

xXx

LETNÍ KURY ESPERANTA pořádá letos rovněž:

Příbor: v trvání 14 dnů a to asi od 5. července. Kurs pro začátečníky kurs pro méně pokročilé a kurs pro pokročilé. Ubytování asi v hotelu a v noclehárně. Informace podá: S-ano Slaný Vlad., Vítkovice, Kutuzovova 29, Ostrava.

Doksy u Máchova jezera: 25. července - 7. srpna. Kursy: če - pro začátečníky, pro pokročilé, konverzační, řečnický a odborný seminář. Informace: Letní kolej Esperanta, Doksy u Máchova jezera, Moskevská 453.

MEM-peranto raportas !!

1. Ni atentigas lokajn delegitojn: Kompletigu aliĝilojn al MEM kaj sendu al samideano Škvrn, Ostrava I, Dvořákova 7.
2. Ni klopodas gajni por ĉiu grupo almenaŭ unu ekzempleron de nia centra organo "PACO", por ke ĉiu estu informita pri novaĵoj de MEM en tuta mondo.
3. Klopodu ligi kontakon kaj kunlaboron kun lokaj kaj regionaj komitatoj de pacamantoj. Ĉiujn sukcesojn eĉ malsukcesojn raportu detale al viaj regionaj junularaj perantoj.
4. Detalajn informojn pri MEM legu en "La Esperantista Laboristo", numero 41 /septembro-oktobro 1953/ aŭ en "PACO", numero 1, novembro 1953.
5. Aliajn informojn kaj proponojn al via aktiva laboro por MEM petu ĉe s-ano Škvrna, Ostrava I, Dvořákova 70

--- Ne pretervidu kaj helpu!! ----

Kiu ankoraŭ ne sendis la monkotizon por la ricevata cirkulero Tagiĝo ni petas faru tiel, ke ni povu kompensi almenaŭ efektivajn elspezojn. Senpage ni dissendas 80 numerojn de Tagiĝo. La perdon poste devas pagi nia junulara grupo. Nia ĉekkonto estas: St. spořitelna v Opavě, č. konta 8155. Por via subteno ni dankas antaŭe.

Via Tagiĝo.

Daŭrigotaj travivaĵoj de ŝipana vojaĝanto – esperantisto

Kiam mi veturadis kelkajn tagojn kun ŝoforo kaj transportadis per la havena aŭto la varon, ni unufoje veturis ankaŭ en malproksiman ŝipejon Krešice.

La vojo estis bona, la aŭto veturis sendifekte, do ni estis kontentaj kaj ĉar jam estis vespero, ni ĝojis, ke baldaŭ ni alveturos Křešice-n kaj poste Děčín kaj tiam estos fino de nia veturado, ni havos bonan vespermanĝon kaj poste ni ripozos en bela lito en la ŝipana hejmo.

Sed kie la diablo ne povas, tie oni trovas virinon, diras la malnova proverbo kaj tio estas vero.

Alveturinte antaŭ Krešice, ni ne povis traveturi la fervojon, ĉar la bartraboj estis mallevitaj. Ni atendis dek minutojn, dudek, tridek minutojn, sed trajno ne veturis kaj la bartraboj restis plue mallevitaj. Kiam ni jam atendis kvardek trian minuton, preteriris ia vilaĝano, kiu ridis al ni kaj poste donis al ni saĝan konsilon: "Ĉu vi volas veturi pluen?" Vi devas multe kribi kaj ululi per la klaksono kaj certe vi post momento havos liberan vojon. Ja hodiaŭ havas servon en la fervojstacio fraŭlinoj kaj ili agas ĉiam tiel. Ili mallevigas la bartrabojn kaj poste babilas pri junuloj, vestoj, dancado kaj similaj aferoj kaj tute forgesas bartrabojn."

Ni obeis la konsilon de la vilaĝano kaj komencis laŭtvoĉe sakri kaj ululi per la klaksono. Post momento ni vidis, ke la konsilo estis efika. La bartraboj releviĝis kaj ni povis forveturi. Kiam ni revenis, la historio ripetis.

Al ni estis simile kiel al Zigmund kaj Hanzelka, kiam ili veturis kun sia Tatra trans ia sudamerika urbo kaj tie sur la kruvojo la semaforo brilis per ruĝa lumo kaj la kruvojpolicano sidis en sia budo kaj babilis kun ia, "senjorito" kaj ne pli frue nur kiam ili komencis ululi per la klaksono, li ŝanĝis la ruĝan lumon je verdan.

S-ek

Mikspoto. /Prenita el HEROLDO n-ro 1/1954/

6.500-jara oni taksas la aĝon de piramido, kies restaĵojn oni trovis antaŭ nelonge en Egiptujo, je distanco de ĉ. 20 mejloj sude de Kairo, en la regiono de Sakkara. Krome estas trovitaj diversaj antikvaj objektoj, inter ili ŝtona sarkofago, kies aĝon oni taksas je preskaŭ 4000 jaroj.

Robinsonoj niatempaj. Antaŭ kvin jaroj pereis argentina fiŝkaptista ŝipeto, kaj oni kredis la kvar ŝipanojn pereintaj kun ĝi. Vivinte la tutan tempon sur nelogita insulo, ili fine sukcesis reveni. Sed tri el ili trovis siajn "vidvinojn" kiel edzinojn de aliaj.

Amnestio en Italio donis al 20.000 malliberuloj la liberecon. Unu rifuzis forlasis la malliberejon. Tio estis la 45-jara stratvendisto Antonio: Devigili, kiu punsidis en la malliberejo de Trento. Li estis kondamnita je unujara kaptiteco pro ŝtelo. "Mi ne volas amnestion, liberigu iun alian!" li kriis. Li petis teni lin en la malliberejo almenaŭ ĝis la printempo, sed nenio helpis: oni simple eljetis lin sur la straton.

El la lernejo. Instruisto: "Kiu povas nomi al mi tri bestojn el Afriko?" Paŭlo: -"Elefante kaj du leonoj."

ELLERNI 2

Pozdĝi jazyk se rozŝiril do Nĝmecka. Velkou prŭkopnickou praci dĝlali L.Einstein, Ch.Schmidt, a W.H.Trompeter. Prvni tvoiril ĉlanky a broŝury o jazyku. Schmidt ziskal k Esp. Norimberskou Jednotu Svĝtovoĝo Jazyka Wolapŭka tak, ŝe tito vytvořili prvni esp. klub /1888/. V Norimberku takĝ vyŝel prvni esp. ĉasopis "Esperantisto" /1889/. Kdyŝ potom tento ĉasopis ohroŝovala finanĉni tiseň, Trompeter ho vzkřisil svĝmi velkŭmi finanĉnimi prostředky.

V letech 1890 - 1894 zaĉinalo se ŝirit mnoho snah o reformu jazyka. Toto samozřejmĝ nepomahalo k jeho rozŝirovani. 1893 ustavila se na navrĝ L.L.Z. "Tutmonda Ligo Esperantista", ktera se sklādala z abonentŭ "Esperantisto". Pak nato uskuteĉnilo se hlasovani o reformnich snahach mezi ĉleny Ligy, kde se ukázalo, ŝe vĝtšina esp. si přeje, aby jazyk zŭstal takovŭm jakŭm je.

V r. 1895 ruskā cenzura zakázala vstup ĉasopisu "Esperantisto" do Ruska, ponevadŝ uveřejňovali ĉlanky L. Tolstĝo. Ponevadŝ vĝtšina abonentŭ ŝilo v Rusku, znamenalo to konec ĉasopisu. Ale v tĝmŝ roce novŭ ĉasopis "Lingvo internacia", vydavanŭ esperantisty v Upsale /ŝvĝdsko/ redaktor Paul Nylen, ho nahradil. Mezi hlavní prŭkopniky esp. ve Francii patřil L. de Beaufront. Byl zakladatelem ĉasopisu "L'Espĝrantiste". Přidali se k esp.: Boirac, prof. Bourlet, G. Chavet, Fruictier, Dr. Javal, prof Cart, G. Moch, Peletier, gen. Sebert a j. Svĝtovā firma Hachatte a ĉile zaĉala s vydavanim esp. literatury. Zde vlastnĝ zaĉina hnuti. /1900 - 1905/. V Anglii propagovali: Mudie, Ĉefeĉ, Rhodes, Wackrill a j.

v Nĝmecku: Borel, Christaller, L.E. Meijer, Dr Mybs a A. Schmidt. Takĝ v mnohŭch jinŭch zemich prŭkopnici zaĉali pracovat pro tutu myŝlenku.

/Al s-anino ŝupichovā ni kore dankas por la kompilo de artikolo: Vortoj de Zamenhof, kiun ŝi afable sendis por publikigi en nia cirkulero./

Vortoj de Zamenhof

Estas bedaŭrinde, ke la verko de Zamenhof estas preskaŭ elĉerpitaj. Tial nur malmultaj esperantistoj legas kaj studas tutan lian verkaron. Tamen ne nur niaj komencantoj, sed ankaŭ lertaj samideanoj akirus multon el la Zamenhofa modela verko. Oni forgesas, ke la studado de Zamenhofa stilo ĉiam kaj al ĉiu utilas, ke ankaŭ la necesa lingva unueco postulas tion.

Ni legu, ni studu la klasikajn verkojn de nia Majstro, de homo genia kaj grandanima, kiu ne ĝisvivis la venkon de sia idealo, sed kiu ĉiam parolas al ni por konsili kaj gvidi nin.

Ni aŭskultu liajn vortojn - ni demandu - l i r e s p o n d o s:

Ĉu vi, kara Majstro, longe okupis vin per ideo de lingvo internacia?

"La demando pri lingvo internacia okupis min jam longe, sed sentante min nek pli talenta, nek pli energia ol la aŭtoroj de ĉiuj senfrukte pereintaj provoĵoj, mi longan tempon limigadis min nur per revado kaj nevola meditado super tiu ĉi afero. Sed kelke da feliĉa ideoj, kiuj aperis kiel frukto de tiu ĉi meditado, kuraĝigis min por plua laboro kaj igi min ekprovi, ĉu ne prosperos al mi sisteme venki ĉiujn barojn por la kreo kaj enkonduko de racia lingvo internacia."

Ĉu la lingvo internacia havis multajn malfacilaĵojn en la unua tempo?

"Jes, ĉar ĝi aperis en tempo kaj cirkonstancoj tre malfavoraj".

Ĉu la pli aŭ malpli granda disvastiĝo de nia afero en tiu tempo dependis de la karaktero de la nacio aŭ de tiu aŭ alia lando?

"Ne, ĝi dependis simple de tio, ke la esperantistoj pli energie laboris kaj kie oni nian aferon pli bone konis."

Certe ĉiuj novaj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas la saman sorton -

"Jes, kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinda obstina malkonfido, sed eĉ kun neklarigebla malamikeco. La pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj ofte suferi, oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn kaj fine eĉ kiel homoj tre malutilajn."

Kion opinios la venonta epoko pri ni?

"Kiam niaj posteuloj legos en la historio, ke la homoj, tiuj ĉi reĝoj de la tero, tiuj ĉi plej altaj reprezentantoj de la monda inteligenteco, tiuj ĉi duon-dioj, en la daŭro de tutaj miljaroj, vivis unuj apud la aliaj, ne komprenante unuj la aliajn, ili simple ne kredos tion. Niaj posteuloj indignos, kiam ili ekscios, ke la homojn, kiuj penadis pri la enkonduko de komuna lingvo, la samtempuloj montradis per la fingroj, ke ili neadis la eblecon de ekzistado de arta lingvo, kiam antaŭ ilia nazo tia lingvo ekzistis, havis jam riĉan literaturon kaj bonege plenumadis jam en la praktiko ĉiujn funkciojn, kiujn oni povus postuli ĉe lingvo internacia – tio estos al niaj posteuloj nekredebla – kaj tamen ĝi tiel estis!"

Kiamaniere ni povas progresigi nian aferon?

"Estas kompreneble multaj vojoj kaj vojetoj por tio, sed ni devas ilin lasi al la bontrovo kaj plaĉo de ĉiu sperta persono. Per pripensado kaj laborado kunligita oni povas pli multe fari ol laborante aparte."

Ĉu ni atendu grandan helpon de la publiko?

"La sola afero, kiun ni devas fari, estas certigi al nia afero regulan senhaltan iradon antaŭen - ne peni fari tro multe per unu fojo, iri malpli rapide, sed regule kaj antaŭ ĉio por eterne sendanĝerigi nian aferon de ĉiu ebla falo kaj halto."

Tio signifas saĝe uzi niajn fortojn...

"Jes, saĝe kaj ekonomie. Se ni per unu fojo volas hele brili, tiam ni baldaŭ laciĝos kaj ni ne sole havos la fortojn iri antaŭen, sed la silento post la bruo estos ankoraŭ tiam pli falanta en la okulojn kaj mortiga por nia laboro."

Kaj se la publiko tamen restas indiferenta?

"Tio ĉi nin ne maltrankviligos, ni laborados trankvile kun la plej bonaj esperoj. Kiel ajn malrapide

nia afero eĉ irus en la unua tempo, ni ĉiam povos esti tute certaj pri nia venko. Ĉar la konstanta falanta guto truas eĉ ŝtonon."

Ĉu via verko la "Fundamento de Esperanto" estas la plej bona lernolibro?

"Ne. Kiu volas perfektigi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, kiuj estis eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte kaj el kiuj la plej gravaj estis eldonitaj tre bone kaj zorgeme sub persona kontrolo kaj kunhelpo."